

# ESPERANTISTO

## ESPERANTYSTA POLSKI

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO KAJ EKSTERLANDE  
MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE I ZAGRANICĄ

ELDONANTO POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO  
WYDAWCA

REDAKTANTOJ PROF. DR. ODO BUJWID — TAD. HODAKOWSKI  
REDAKTORZY

APERAS LA 1-an DE CIU MONATO. REDAKCIAN MATERIALON ONI PETAS SENDI  
GIS LA 20-a DE CIU MONATO.

### PROPAGANDO DUM LA KRIZA PERIODO.

Traleĝinte kelkajn lastajn numerojn de nia ĝeneva organo de UEA, ni devas kun korporemo konstati, ke la nuna situacio ne estas favora por propagando. En kelkaj landoj propagando tute velkis, en aliaj ĝi troviĝas kvazaŭ en situacio antaŭ katastrofo kaj nur en Eŭropo ĝi disvolviĝas, sed versajne (mankas al ni la statistiko) ne atingas la antaŭan nivelon. La situacio similas la dum-militan. La kaŭzojn ĉiuj konas: la krizo, kiu furiozas en la mondo, kaj kies findaton ne povas antaŭprofeti eĉ la plej talentaj ekonomistoj.

Malagrabla estas ankaŭ la situacio de UEA. Ĝi estas minacata de la deficito, kiu povas ĝin paralizadi dum ia tempo.

Ne tre agrabla estas ankaŭ situacio de apartaj societoj. Iliaj iamaj membroj ne estas tiel energi-plenaj, kiel antaŭe: ilian energion forrabas la batalo por la vivo.

Aliflanke malgraŭ tre malfavora situacio, por kiu estas nenia alia rimedo, ol ĝin (kiel dummilite) tradaŭri, oni povas ankaŭ legi pri tute neatendita bona ek-sento kaj ekkompreno, ke la ĝisnunaj metodoj de propagando, se oni troviĝus eĉ en la plej favora situacio ekonomia, ne sufiĉus plue, ke oni devis pliprofundigi la agadon en diversaj fakaj asocioj kaj tiel plu. Se oni tion eĉ traleĝas, oni devas konstati, ke en nia Esperanto-movado ĉiam estas multe da freŝaj fortoj kaj se eĉ iuj agantoj disfrotiĝas en la batalo por nia verda estonteco, tuj aliaj

estas prelatj ilin anstataŭi kaj preni el iliaj svenantaj manoj la stadardon, kiun ili ĝis nun firme kaj fiere portis.

Sed unu el proponoj nin ĵom malkvietiĝas, kaj eble estus bone atentigi pri ĝi nian ĝenevan centron, estu ĝi pli bone informita ol mi, malproksimulo, nome la propagando en la Ligo de Nacioj.

La sorto nin gardu kaj ŝirmu nian spiriton antaŭ la falsa paŝo, por ke ni ne renovigu la pritrakton de Esperanta Akordo kun tiuj ĉi politikistoj, kiuj principe (se oni povas tiel diri) nenion scias pri Esperanto, krom eble tio ĉi, ke, laŭ ilia opinio, oni povas pri ĝi paroli kaj diskuti senprezare. Pri ĥemio oni ne povas paroli, ne konante ĝin, ankaŭ same pri la medicino kaj aliaj branĉoj de la scienco, sed pri Esperanto oni povas senprezare ripeti kun serioza mieno la samajn azenecaĵojn, kiel antaŭ 48 jaroj. Tial el la diskuto en Ligo nenio saĝa eliros, same kiel antaŭ 10 jaroj nenio saĝa estis dirita. En plej favora por ni situacio oni ricevos ian anemian rezolucion, kiu devigiĝos neniun al nenio kaj nenio.

Alia metodo estus pli taŭga (tiel ŝajnas al mi), nome senpera pritrakto en la oficiala programo kun apartaj diplomatoj kaj politikistoj. Se ili estus por la ideo de la Akordo malfavoraj, oni ilin lasos en la kvieto, aŭ zorgos ilin influj pere de aliaj personoj kaj ne rapide. Ilia nea opinio

ne estos kalkulata kaj ne influos rezolucion kiel tio ĉi certe okazus, se oni kalkulus la voĉojn por kaj kontraŭ en Ligo de Nacioj.

Krome: oni ne komencu la intertraktadojn kun la okcidenteŭropaj politikistoj. Ili reprezentas la ŝtatojn, kiuj tre fieras pri la granda influo de iliaj nacioj kaj lingvoj. En iliaj koroj profunde kaŝiĝas, ankoraŭ buŝe ne eldirita espero, ke la lingvo de ilia nacio fariĝos iam internacia. Tial oni lasu ilin en la kvieto kaj unua-paŝe ni komencu de Mez-kaj Nord-Eŭropo. La zono de ŝtatoj de Finnlando ĝis Grekujo, eble komencante de Ĉeĥoslovakujo, kies energia diplomato kaj estanta prezidanto de la Respubliko estas (ministro Beneš) favore akordita por Esperanio.

## EN UNUECO NIA FORTO!

En unueco nia forto! — ŝablonaĵoj, kiujn oni ĉiam ripetas, alvokas kaj trompetas. Per senĉesa ripetado ili perdis sian valoron kaj ilia efiko estas preskaŭ nula. La trouzo alportis nur senvalorigon de ilia senco kaj iĝas al ilia kontraŭo, al individua agado sen atento je penoj kaj provoj de niaj proksimuloj. Por polaj esperantistoj la supraj vortoj havas specialan signifon, ĉar ni, Poloj, tre ŝatas agadi individue kaj ignori kunigon de la fortoj por komuna kaj fruktodona laboro. Kvankam neniu neas valoron de kunigo, tamen estas tre malfacile kurigi ĉiu personojn ĉu grupojn por formi fortan kaj signifopovan ĉelon, kiu posedus influon je direktado de la esperanta politiko. La fortoj dispeciĝas kaj nia voĉo valoras „voĉon en dezerto“.

Malgraŭ senvalorigo de tiuj ĉi signalvortoj mi opinias, ke estas necese rememorigi je ili kaj provi vivigon de ilia signifo kaj valoro. La mondo estimas kaj aŭskultas nur la fortajn!

Tiu ĉi mallonga alvoko celas fortigon de P.E.D., kiu tiam influos reprezentantojn de esperanta internacio — U.E.A. La reorganiziĝinta U.E.A. kunigas nun ĉiujn landajn asociojn kaj estas centro de nia politiko. Estas do devo de ĉiu konscia esperantisto aliĝi al U.E.A. Ĉar de mul-

Sed ni havu neniam iluziojn, ke ni scipovos ion sukcesigi, sen preparo de publika opinio pere de la kolekto de favoraj por ni plebiscitoj. Pri tio ĉi mi jam skribis, sed oni nenion faras tiu-direkte. Ni ded ĉu la krizan periodon, dum kiu ĝenerale ne multe estas farebla, por la kolekto de favoraj al ni opinioj. Se la krizo fine malaperos kaj oni povos kun granda energio ataki la registarojn, por ke ili subskribu fine la Akordon, tiam ni estos jam mobilizitaj.

Jen kion oni povas prepari dum la kriza periodo, dum kiu grandskale nenio estas preparebla.

Dro Antoni Czubyński (Koluszki).

## NIA FORTO!

taj flankoj aŭdiĝis voĉoj, ke pro la reorganizo de U.E.A. oni ne scias, kiamaniere oni povas aliĝi al ĝi, mi donas sube necesajn klarigojn rilate al la procedmaniero.

Ekzistas du formoj, laŭ kiuj oni povas fariĝi membro de U.E.A.: serpera kaj pera. Senpere povas aliĝi ĉiu esperantisto aŭ ĉe la loka delegito aŭ ĉe la ĉefdelegito. Ekzistas tri kategorioj de la membroj: simpla (M.J.) abonanto (MA) kaj subtenanto (MS). Membro MJ pagas kotizon de zł 8 jare kaj ricevas krom legitima karto kaj servokuponaro jarlibron; membro MA pagas zł 18 jare kaj ricevas ankaŭ gazeton „Esperanto“; membro MS pagas zł 45 jare kaj ricevas ankoraŭ libran premion.

La dua maniero de aliĝo estas pere de P.E.D. Ĉiu individuo devas aparteni al la loka grupo ĉar nur grupoj povas esti membroj de P.E.D. kaj tiamaniere fariĝi membro de P.E.D. kaj U.E.A. La grupoj pagas al P.E.D. zł 0.90 jare por ĉiu sia membro kiel kotizo destinita por U.E.A. Tiu ĉi membro ricevas legitiman karton kaj servokuponaron.

Do aliĝu al via grupo kaj pere al P.E.D. kaj U.E.A. -

En unueco nia forto!

AH.

### GRAVA SCIIGO POR KURSGVIDANTOJ!

Bonege konservitan, kompletan, antikvaran kursmaterialon laŭ Ĉe-metodo, bezonegan por kursgvidantoj havigu ĉe „Pola Esperantisto“, Kraków, Lubicz 34. Prezo zł. 18.— kun afranko.

### ĈU VI JAM FINPAGIS LA ABONON POR J. 1934?!

SE NE  
PAGU TIUJ JE NIA KONTO  
P. K. O. 406.660.  
RENOVIGU LA ABONON  
POR JARO 1935!



# MAURYCZY MOCHNACKI

(okaze de 100-a datreveno de lia morto).

Jus pasis 100 jaroj depost morto de Maurycy Mochnacki (legu: Mofnacki), unu el la plej gravaj estetikistoj kaj kritikistoj polaj en la unua triono de la XIX jarcento, kiu multe alportis al la ĝusta kompreno de novaj vojoj en la literaturo reprezentataj tiam de t. n. romantikistoj.

La pseudoklasika periodo pro sia inklino al fremdaj, ĉefe francaj modeloj, elvokis en Polujo ledon kaj sekve proteston kontraŭ tiu maniero baziĝanta sur nesincera inspiro.

La eksterliniaj najbaroj pli frue ekprenis batalon kontraŭ doktrinecaj principoj kaj formulis novajn postulojn en la disertatoj de Lessing, Herder, fratoj Schlegel kaj en la verkoj de Walter Scott, Byron, Lessing, Schiller, Goethe k. a., koncernantajn (nostulojn) la rolon de fantazio en la verkado.

En Polujo tiun rolon jam prenis sur sin prof. Kazimierz Brodziński (1791—1835). Li estis tamen sufiĉe singarda kaj modera en siaj postuloj koncerne novajn vojojn en la poezio kaj verkado. Li montris la folkloron kiel fonto de inspiro pri novaj ideoj.

Kaj ius aperis Mickiewicz kun siaj „Baladoj kaj romanoj“, vekante tuj batalon inter la tiamaj rigidiĝintaj kritikistoj, kiun li cetere tiel sarkasme revenis.

La balalkampon suriris Maurycy Mochnacki (1800—1834).

La tempo post la dispartado de Polujo inter tri najbarŝtatoj ne lasis junan kaj enflamiĝeman animon kvieti, sed kaptiris lin en la rondojn de armitabalo kontraŭ la perforto. Li varme partopre-

nis la insurekcion en la j. 1830/31 per publikaj paroladoj, entuziasmigaj artikoloj, kaj kiam la afero falis, li estis devigiĝita elmigri.

La famon kaj memoron li meritis per sia publicista agado, per sia literaturo-kritikista verkado kaj per la verko pri la insurekcio 1830/31.

Fama estas lia verko: „Pri la pola literaturo en la XIX jc.“. Per la kritiko de Mickiewicz, Zaleski, Malczewski, Goszczyński — tiuj pioniroj de romantiko en Polujo — li konfirmis sian filozofian prepariĝon kaj alportis multe al la kritikista metodo kiel scienca branĉo. Li montris bonmanieran guston, elegantecon, ĝustan kaj trafan pritakson eldiratan kuraĝe en lingvo viva, ĉiun deviganta.

Li klarigis konvinke, ke dank' al niaj poetoj romantikaj la literaturo iĝis vere nacia kaj la popolo retrovis sian memkonscion, aŭdante, ke per tiuj verkoj nia literaturo novas honore konkeri apudlokon en unu vico kun plej potencaj kaj signifaj popoloj.

Nune kiam la verkado troviĝas denove en la periodo de ioma kaos, kiam ĉiuj valoroj perdis sian valoron, kiam ĉiuj verkistoj vetserĉas novan esprimmanieron kaj novajn ideojn, ne kontentigante per iomaj sukcesoj, ne estos sen valoro rememorigi, ke en simila situacio antaŭ 100 jaroj troviĝis intelektulo, kiu tiujn vojojn intuicie divenis, ĝuste prijuĝis kaj elokvente ilin klarigis.

Similan vojmontriston ni hodiaŭ atendopiras.

Józef Orzech.

## PAROLADO DUM LA BELMONTA VESPERO.

Per kompletigi la paroladaron, aŭdigintan dum la solena vespero honore al Leo Belmont, ni prezentas ĉi-sube la enkondukan paroladon de s-o W. Róbin. La parolado estas tradukita el la pola lingvo.

La Red.

Kun vera plezuro kaj kontenteco mi havas la honoron malfermi la solenan vesperon je honoro de la eminenta literaturisto, poeto kaj redaktoro Leo Belmont. Mi faras tion kun tiom pli granda plezuro, ĉar mi havis eblon rigardadi la vivon kaj laboron de L. Belmont sur kampoj literaturo kaj Esperanta preskaŭ depost 40 jaroj.

Sur la kampo de disvastigado de E-

speranto la jubileulo estas enkalkulata al la plej eminentaj kaj plej senlaca pioniroj de tiu ideo. Al la plej senlacaĵial, ĉar depost la naskiĝo de Esperanto ĝis la hodiaŭa tago li laboras sur tiu kampo, aĝas kaj propagandas per vorto kaj faro.

Li aliĝis al tiu movado tiam, kiam la aliĝo al Esperanto estis minacata de moko. Leo Belmont ne senvolontiĝis, ĉar per sia profunda intuicio li eksentis, ke ĝi estas serioza afero, ke valoras por ĝi laboradi kaj ke venos momento, kiam ĝi venkos. Tion li eĉ antaŭdiris tiam, kontraŭe al la opinio de multaj kompetentaj „specialistoj“ lingvaj.

La tutbaldon de meritoj de L. Bel-

mont sur tiu kampo priparolos tuj unu el la hodiaŭaj prelegontoj.

De mia flanko mi aldonas, ke L. Belmont, kiel bonega pro Dia graco oratoro Esperanta, ĝuas popularecon en nia mondo, ke dum liaj paroladoj dum la universalaj kongresoj ĉiam mankas lokoj, ke kun ni estas la tuta Esperanta mondo kaj en la plej foraj teranguloj honoras hodiaŭ la senlancan laboron de la jubileulo.

Multaj verkoj de Leo Belmont estas

## LINGVA DISKUTO.

En kelkaj sinsekvaj numeroj de Pola Esperantisto Leono Vienano penas komplete konvinki la recenzistojn, ke estas ĝusta jena frazo, uzita de li „la koncerto daŭris ĉirkaŭ du horoj“, ĉar prepozicion ĉiam sekvas nominativo, escepte kiam estas montrita direkto post la prepozicio.

Cio ĉi estas ĝusta, sed ne pri tio temas en ĉi tiu okazo. Kial oni delatege parolu pri reguloj, rilatantaj prepozicion, se en la citita frazo „la koncerto daŭris ĉirkaŭ (proksimume) du horojn“ nenia prepozicio ekzistas. Oni ja ne povas el adverbo perforte fari prepozicion kaj altrudi al ĝi regulojn de la prepozicio.

Kiel jam estis klarigite de diversaj personoj, „ĉirkaŭ“ estas uzata kelkiam kiel prepozicio, kelkiam kiel adverbulo, samsenca kiel „proksimume“, do la sola pridiskutebla demando povas esti nur tio, ĉu uzi la adverbulo „ĉirkaŭ“ sen adverbulo finaĵo, kion estas ĝis nun farintaj bonaj esperantaj stilistoj kaj ankaŭ L. Zamenhof, aŭ por eviti dubojn ĉe komencantoj uzi la adverbforman „ĉirkaŭe“.

„Ĉirkaŭ (proksimume) dudekjaraj“ ne estas absurdo, kiel asertas L. V., ĉar „ĉirkaŭ“ ja neniookaze ĉi tie povas esti prepozicio, same kiel ĝi ne estas prepozicio ekz. en la frazo „ĉirkaŭ“ (proksimume) tri homoj sidis apud la tablo.

Kun intereso ni legis la „Lingvan Angulon“ de P.E.; ni trovis multajn atentindajn en la klarigoj de Leono Vienano, sed ne ĉiuj el ili komplete konvinkis nin kaj same ni trovis, ke en lia novelbiblioteko la stilo ne ĉiam estas tute imitinda.

Kio rilatas la firmon „morgaŭe“, do ĝi eble estas aprobinda, sed L. V. eraras asertante, ke ĉiu lingvo posedas koncernajn du formojn por la menciitaj diferencaj nuancoj.

En la noveloj ni trovis neimitinda-

tradukitaj en diversaj lingvoj eŭropaj kaj aziaj. La nomo de la jubileulo brilas kiel granda stelo en unu vico kun tiaj nomoj kiel Antoni Grabowski, Adam Zakrzewski, Odo Bujwid, — kiuj disvastigis la famon de la pola nomo en la tuta mondo kaj devigis la alilandanojn turni la okulojn al Warszawa kaj Pollando; kiel lulilo de Esperanto. Kiel al malnova sidejo de plej brilaj mensoj Esperantistaj en la mondo. Vivu Leo Belmont!!

Dr. Wilhelm Róbin.

jojn, el kiuj ni notu jenajn: Mi ne sukcesis okupi sin, sur la strato multe da kotajoj, dum kalandrado de tolaĵoj, plielikatiĝi la haŭton per kosmetikoj, mortis pro drinkeco, kavalirojn odorantajn pomadon, puŝita sur la mucon, apogis la kapon sur la brako, frapis per la mano surviŝaĝe, pantera felo *jetita ĉe la kameno*, arkajoj apogitaj per kolonoj, si amis interbati sin ŝerce, li kisis sin flanke sur la kolo, stampi ununuran unikan kison sur tiu ĉi ŝia ridanta buŝo, timo antaŭ la rabistoj, en la kapo eksidis al li akra malespero, matracoj en ruĝaj strioj, teksfliki (retriki?). Venero, laĉo da perloj, alportante tutajn ŝtrumpojn, interdiziĝo, malgraŭ ke (kvankam) ni revenu hejmen per vespera ŝipo (ĉu ne reveturu?).

Estas bedaŭrinde, ke eĉ libroj, kies aŭtoroj asertas, ke ili havas imitindan stilon, ne estas senriproĉaj. Kio rilatas al blinda imitado de Zamenhofa lingvo, oni devas esti singarda: Zamenhof mem en la posta periodo evitis la uzadon de kelkaj formoj el la unuaj jaroj de Esperanto. Multo en la daŭro de preskaŭ 50 jaroj arkaikiĝis, ekz. la troa uzado de la akuzativo ĉe forlaso de prepozicioj, kaj estus neutile por la progreso de nia lingvo, se oni ree donus al ili la iam poseditan plenan vivrajton.

Lingva Rondo, Tallinn.

B R O S Z U R A

Mgr. fil. B. S T R E L C Z Y K A  
p. t.

„Problem języka międzynarodowego“ niezbędna dla każdego Esperantysty i interesujących się problemem języka międzynarodowego, znaleźć się powinna w każdej poważniejszej bibliotece. Do nabycia w admin. „Pola Esperantista“,

Kraków, Lubicz 34.

Konto PKO Nr. 406.660.,

w cenie 60 gr. wraz z przesyłką.



## K R A K Ó W I N V I T A S I

En la lastaj tagoj de junio okazos en Kraków t. n. „Kraĉovaj Tagoj”. Celante ebligi al polaj esperantistoj partoprenon en tiu ĉi festo, P.E.D. organizas en la tagoj 29. — 30. VI. 1935.

### VII. POLLANDAN KONGRESO DE ESPERANTO.

Adreso: P.E.D., Kraków, ul. Lubicz 34. Kotizo: zł 4.—, por familianoj, studentoj zł 2.—, por senlaboruloj senpage. Konto P.K.O. Nr. 411.404 (Delegacja Esperantystów w Polsce).

Fervojobato estas ligita kun „Kraĉovaj Tagoj”. Detaloj sekvas.

Loĝejoj: pro multnombra vizitado de Kraków en tiuj ĉi tagoj estas necesa frua mendo.

#### Organiza Komitato.

Samtempe kun la Kongreso okazos en la tagoj de 29. — 30. VI.

### GENERALA KUNVENO DE P. E. D.

En ĝi rajtas partopreni la aliĝintaj grupoj per siaj rajtigataj reprezentantoj. Ĉiu reprezentanto devas posedi skriban rajtigon, en kiu estu citita nombro de la

membroj. Ni atentigas, ke laŭ art. 10 § 2 membroj, kiuj ne pagis la kotizon, ne rajtas voĉdoni.

**Tagordo:** 1. Raportoj, 2. Decido pri la enskribpago kaj kotizo, 3. Fikso de la sekvanta Ĝ. K., 4. Elektioj, 5. Demandoj kaj proponoj. Proponoj pri la tagordo devas esti senditaj 2 monatojn antaŭ la Ĝ. K.

Art. 26. § 1. La Ĝ. K. estas decidopova, se la ĉeestantoj rajtigataj al voĉdono reprezentas minimume 1/4 da ĉiuj voĉoj, per kiuj disponas ĉiuj membroj de P.E.D. kune.

§ 2. Se la Ĝ. K. ne okazus pro manko de la nombro necesa laŭ § 1, devas la Estraro en du sekvantaj semajnoj kunvoki denove la Ĝ. K., dum kiu la decidoj estas alprenataj sendepende de la nombro da reprezentitaj voĉoj. Al tiu ĉi nova Ĝ. K. ne validas difinoj de art. 21 §§ 1 kaj 2 art. 25 § 3 alineo 1.

Estraro de P. E. D.

## LWÓW — SEMPER FIDELIS.

Al S-ro RADIO-DIREKTORO PETRY sindone dediĉite.

Reklamo flamsignalas: „venu al Lwów.. estingiĝas... resaltas okulen „venu al Lwów“... urbafişo petoldancas „vizitu Lwów“”. Heraldik-leono, kuraĝa kaj forta, levas sian antaŭpiedon invite al Lwów.

Neonlumo eksiblas, malfermas brilan okulon, irizas, palpebrumas, flam-tremas dom-maron en helecon.

El nokta ĉielo reliefigas turoj gracilkorpaj, krucornamitaj, nubskrapulon ĉirkatondas trafiko muĝanta.

Kantas dolĉan melodion puteto... kartavas fortgorĝa laŭtparolilo sovaĝan ĝazbandmuzikon, ekhurlas saksofono el nokta kafejo, kvikkantas ĉifonulo, plendante.

Stona Dipatrino sur ĉefplaco benante levas siajn manetojn, kapon sian aŭreolas elektraj flamoj.

Al stelumita ĉieltuko ekbojas aŭtomobiloj... ekfajfas signaloj, ekkriaĉas voĉoj de noktaj komercantoj, ekgrincas radoj. Magazenoj... vitraj faŭkoj elsputas virinajn kordezirojn, silko tente ĉirkaŭvolvas gracilkorpan vantulinon... sukerajejoj... migdalokulaj tortoj dibĉe vendofertas sin, laktkremo ŝaumkirlas en gracilkolaj vitraj kalikoj.

Lwów — mil naŭcent tridek kvara.

Salto trans jarcentojn. Spirita retrookulumo al Lwów — de hieraŭ.

Kie en 1934 trafiko pulsanta — laĝoj bluokulas. Kie parkoj verdas, refreŝiĝas, ĝojigiĝas — marĉoj, ĉastravadataj de pravaĵoj niaj.

Patrino arbaron petole adiaŭas infano — rivereto Peltevo, gajdancante, rulsaltante tra l' urbo.

Fiera „Alta Kastelo” ĉielenetendiĝas — ĉe l' piedo ĝia — humilas lignodometoj.

16-a jarcento.

Stonaj domoj... bruo... komercado. Lwów — ligilo inter Oriento kaj Okcidento. Profitas de germana ordemo, itala talentego, armena temperamento — juda sagaca komercemo. Trezoroj, ekzotikaj amasiĝas sur foirplaco, brilblindiĝas, sorĉallogas, ornamas signokulajn, belkorpajn urbaninojn.

Lwów, kaldrono de riĉeco, rezervujo de diversnacieco. Tintas moneroj en lertaj fingroj, rulsovas oron publikaj monŝanĝistoj — jen Plac Weksiarski.

Gastejoj malfermas siajn pordojn por fremdularo — Lwów etendiĝas, potenciĝas. Italaj pridonacas per renesanca formo — majstroverkoj sorĉas, ravas la po-

lan urbon. Lwów, pia kaj kredema. Ek-  
kestas Diaj lokoj, ornamitaj per orajoj  
— oferdonacoj de riĉuloj konstruigas  
„ĉielon sur tero“.

La jarcentoj preterglitas antaŭ la oku-  
lo. La historio de spirita kaj kultura  
movadoj en Lwów entenas nomojn kaj  
agojn de personoj, kies famo penetris  
en ĉiujn angulojn de l' ruliĝanta terglobo.

Ho, pola reĝo, kuraĝa defendanto, Jan  
Sobieski. Monumento de altĉevalo sidan-  
ta heroo salutas nin.

En la mezo de la urba ĉefplaco — la  
Pola Profeto, geniulo Mickiewicz.

Lwów, urbo de pentraĵoj, skulptaĵoj,  
muziko. Teatro reprezentas Polan Spi-  
riton, prezentas polan arton.

Muzeoj montras okulĝojojn — broda-  
jojn, juvelojn; moneroj, medaloj ravas  
numismatikulojn; jen majstroverkoj de l'  
peniko, kreitaj de Matejko, Siemiradzki,  
kiu pentris la urbeatran kurtenon, kolor-  
riĉaj pentraĵoj de Nowakowski, kiuj tro-  
vis fortan eĥon en la artista mondo.

Lwów, atakita de sangavidaj malami-  
koj dummilitaj.

Junularo Lvova defendis sian karan  
urbon... en plenumo de la heroo devo  
mortfalintoj. Kruco apud kruco, super  
tomboj de Lvovaj Defendintoj... florkro-  
noj kovras la lastan ripozejon de la ju-  
nai herooj.

En la vento flirtas la standardo: Bla-  
zono — tri bastionoj — leono forta kaj  
kuraĝa levas sian anfaŭciedon al juro:  
Leopolis — semper fidelis.

Minuŝka Mante'.

## LUDMILA JEVSEJEVA.

### POR MOMENTO...

Por momento min kaptis ĝojego,  
Por momento ekbrilis okul',  
Por momento foriris el koro  
Plumbogriza, premeza nebul'.

Por momento al juna animo  
Sorĉridetis lotusa floret',  
Por momento vi flustris, knabino,  
„Jes“ — al mia insista korpet'.

Por momento, kaj poste denove  
En la koro despotas nebul'...  
Jam velmortis petalo lotusa,  
Ĝin priploras larmlena okul'.

Kaj denove mi sola en mondo,  
Tute sola kun mia ĉagren',  
Kaj mistakte tamburas la koro  
Nekredanta je Krista alven'.

## Al la Redakcio de „Pola Esperantisto“

Kraków.

Estimataj Sinjoroj!

Ni havas la honoron peti vin publiki-  
gi en „Pola Esperantisto“ ĉi-suban pro-  
leston, akceptitan unuanime de l' jara  
ĝenerala kunveno de l' Esperantista Ron-  
do „Konkordo“ en Varsovio, la 28. II. 35.:

„Esperon ne venkos la fajro, nek  
ŝtal', nek ies perfidoj subitaj“.  
(Grabowski. „La tagiĝo“).

La makulo sur la ŝtono de la monu-  
mento de d-ro Ludoviko Zamenhof (alu-  
dita en la novembro numero 1934 de „Po-  
la Esperantisto“ de f-ino Lidja Zamen-  
hof) povas esti kaj estos forviŝita: pri  
tio zorgos la fidelaj gardistoj de la Za-  
menhofs monumento.

Cu ekzistas tamen sufiĉe akra viŝilo  
por forigi — ho! kiom multe pli abome-  
nan, pusan, malbonodoran makulon, kiu  
subite ekaperis sur la ĝis decembro 1934.  
lojala kaj fidela al Zamenhofs ideo kaj  
idealo gazeto „Esperanto“, oficiala or-  
gano de Universala Esperanto-Asocio?

Kun indigno de malnovaj esperantistoj  
kaj honestaj homoj ni demandas Vin, kiu,  
kiamaniere, per kia vojo aŭ rimedo fa-  
ris ebla la neblon, efektiviĝis la ĵter  
honestaj homoj neniam efektiviĝeblan, ke  
sur nian puran kampon oni provas ma-  
lice semi lolon.

Kiamaniere povis aperi artikolo: „La  
germana vidpunkto pri la rasproblemo“  
(No 412, XII. 34. „Esperanto“), en kiu  
la aŭtoro ne hontas eĉ glori unu el la  
reprezentantoj de rasfuriozo, kiu kvazaŭ  
„respektas la propran valoron de frem-  
daj rasoj“ k.t.p.

Ni ne intencas ĉi tie paroli pri Hille-  
rismo: ĝi estas por samideanoj de Za-  
menhof io tro monstra. Sed ni volas cer-  
tifi Vin, ke ni kaj — esnereble — gran-  
dega amaso da esperantistoj zorgas pri  
la baldaŭa senkompata elŝiro de l' so-  
vaĝa lolo el nia fruktodona kampeo.

Ni komunikas, ke ekde nun nek ni, nek  
niaj membroj subtenos U.E.A. Ni espe-  
ras, ke ni ne estas la solaj, kiuj rifuzas  
al Vi moralan kaj materialan subtenon.

Esperantista Rondo „Konkordo“, War-  
szawa.

Sekretario: Prezidanto:  
(—) Dr. P. Muszkatblat. (—) B. Weintal.

Abonujcie miesięcznik „Ondo de Dan-  
gava“ i „Informoj de Estonio“ w cenie  
zł. 2.20 rocznie. Abonament przyjmuję  
admin. „Pola Esperantisto“. Konto  
P. K. O. 406.660.



LEONO VIENANO

*Ĝa nigraj flugiloj de la krizo.*

(Rakonto)

Sur la tria benko en la dua vico de la lerneja klaso sidas du kolegoj, Ludoviko kaj Karlo. La trian jaron ili vizitas kune la saman lernejon. Kiam ili komencis lerni en la unua klaso antaŭ tri jaroj, ili renkontiĝis unufoje kaj sur unu benko sidigis ilin okaze la instruisto kaj de tiam ili algluiĝis anime unu al la alia kaj ili vivis pace konstante.

Sur unu strato loĝas Ludoviko kaj Karlo. Iliaj domoj staras sur la du flankoj de la strato unu kontraŭ la alia. Kiam ili estis ankoraŭ lernantoj de la unua klaso — sepjaraj infanoj — ili ankoraŭ tiam deziris intervidiĝi posttagmeze kaj pasiĝi kune la restintan tempon post la lernejaj okupoj. Kune ili preparis la lecionojn kaj kune ili ludis diversajn ludojn. La parencoj de Ludoviko estis riĉaj kaj ilia loĝejo komforta kaj oportuna por ludoj kaj tial ili ekdecidis kunveni ĉiam en la loĝejo de Ludoviko. Verdire oni ne parolis pri tio speciale, sed tio ordiĝis tiel per si mem. Kiam la kolegoj vizitis kelkfoje unu la alian, ili konvinkiĝis rapide, ke estas pli bone por ili ludi en la domo de Ludoviko.

En la vintraj tagoj posttagmeze Ludoviko ŝatis viziti la kinejojn, kompreneble, akompane de unu el la plenkaskuloj, sed la ĝojo estis komplete nur tiam, kiam lia kolego Karlo ankaŭ aliĝis al li. Tiam la feliĉo atingis sian supron.

Jen ili sidas en salono, kies elektraj lampoj estas estingitaj, la mano de unu tenas tiun de la alia kaj iliaj okuloj estas direktitaj al la ekranon, sur kiu aperas bildoj belegaj kaj animskuaĵoj. Tiam ili ŝatis klini la kapon unu al la alia kaj interparoli per miste aŭ flustro pri la bildo, kiu ekaperis en la mallumo.

Tiel pasis al ili du jaroj en unu lernejo, en unu klaso (la unua kaj dua klasoj) kaj sur unu benko. En la tria jaro pli kaj pli fortiĝis ilia amikeco. Ili jam povis kompreni multajn aferojn, kiujn ili ne atentis antaŭe.

Jen aŭdis Karlo tre ofte la vorton „krizo“. Komence li tute ne komprenis la signifon de ĉi tiu vorto. Kiam li demandis unufoje sian patron: Paĉio, kion vi nomas „krizo“, respondis al li la patro jenon:

„La homoj ne havas monon por aĉeli diversajn komercaĵojn kaj tial ne havas ankoraŭ la komercistoj monon kaj

la laboristoj ne havas laboron, ilia poŝo estas senmona kaj ili ne povas perlabori sian vivopanon. Krizo estas en la mondo“.

Rapide Karlo mem komencis senti la malbenitan krizon tre forte. Multfoje estis lia patro devigita rifuzi al li, kiam li petis lin pri poŝmono.

La tempoj fariĝis ĉiam pli kaj pli malbonaj eĉ tiagrade, ke la patro de Karlo ne estis en stato pagi la lernejon por sia filo. Kaj Karlo ne ricevis tiutage lernejan enirbileton. La morgaŭon renkontiĝis la du kolegoj antaŭ la pordo de la lernejo. Karlo staris malĝoja ĉe la pordo. Liaj ĉiuj kolegoj eniris unu post alia, eltirante el sia poŝo verdan enirbileton kaj montrante ĝin al la lerneja servisto. Sed li — Karlo — staris deprimita ĉe la pordo kaj la vojo al lia lernejo estas al li fermita. Ludoviko rigardis sian kolegon kaj lia koro svenetis.

La unuan fojon li disiĝis de sia amiko antaŭ la sojlo de la lernejo matene, antaŭ la lecionoj mem. Kun rompita koro enpusiĝis Ludoviko en la lernejon, post kiam li montris sian enirbileton.

Aŭdiĝis la sonorilo. La lernantoj ekokupis siajn sidlokojn. Sed unu loko sur la tria benko en la dua vico restis libera.

La instruisto voĉlegas la nomojn de la lernantoj kaj en la klasoĉambro aŭdiĝis la sonoj „jes“ kaj „ne“ alterne. Je la respondo „ne“ la instruisto esplordemandas la lernantojn, „kial li forestas?“ kaj li ricevas klarigojn pri malsano de malvarmumo k.s. Kiam venis la vico al Karlo, aŭdiĝis voĉo larmsufokita de Ludoviko.

„Li forestas!“

„Kial?“ — miris la instruisto.

Ludoviko mallevis la kapon kvazaŭ hontanta kaj respondis per malforta voĉo:

„Li ne havas enirbileton“.

En la klasoĉambro ekestis furebra silento. La krizo etendis siajn nigrajn flugilojn...

---

Poŝtejn, Ĉeĥoslovakujo. — Ing. Leopold Berger kolektas adresojn kaj portretojn (precipe fraŭlinajn) por sia „BES. Adresaro de esperantistoj el ĉiuj landoj“ kaj ankaŭ E-glamarkojn. Skribu tre legible la adreson!

**Halina Weinstein, Warszawa, str. Leszno 99 n. 5. P.K.O.-konto Nr. 27867. Tel. 59837 akceptas abonojn por jenaj gazetoj:**

**Pola Esperantisto** jare zt. 8.—; duonjare zt. 4.—; kvaronjare zt. 2.—; opa numero zt. 0.70.

**La Praktiko** jare zt. 8.—; duonjare zt. 4.—; opa numero zt. 0.70. Abona jaro komenciĝas en januaro kaj julio.

**Literatura Mondo** jare zt. 15.75; duonjare zt. 8.75; kvaronjare zt. 5.25; opa numero zt. 1.75.

**Lingvo-Libro** (kvaronjara gazeto) jare zt. 1.40; opa numero zt. 0.35.

**Ondo de Daŭgava** jare zt. 2.20; opa numero zt. 0.20.

**Informoj de Esperanto-Asocio de Estonio** jare zt. 2.20; opa numero zt. 0.20.

**Esperanto dla Wszystkich** jare zt. 2.—; opa numero zt. 0.20.

Nur ĉe mendo de unuopaj numeroj aldonu por poŝtelspezoj 10%, minimume zt. 0.10. Aĉeteblaj ĉiuj eldonaĵoj de Pola Esperantisto, Literatura Mondo, La Praktiko k.t.p. Sendante monon bonvolu precize indiki la celon de la engaĝo. Por korespondaĵo aldonu poŝtmarkon.

**RIMARKO:** aĉetebla kaj mendebla **ENCIKLOPEDIA DE ESPERANTO**. Detalaj prospektoj pri la Enciklopedio, katalogoj de Literatura Mondo kaj prospektoj pri aliĝo al **AELA** (Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj) estas dissendataj senpage. Aliĝoin al **AELA** kaj mendojn por la libroj kaj abonon por **Lit. Mondo** sendu al la supre montrita adreso.

## FLOREKSPOZICIO EN HEEMSTEDĖ apud HARLEMO.

15 marto — 19 majo 1935.

La duna regiono de la nederlandaj provincoj Nord- kaj Sudholando estas mondkonataj pro siaj multkoloraj bulbokampoj dum la printempo. Miloj da eksterlandanoj ĉiujare vizitas la ĉirkaŭaĵojn de Harlemo, por ĝui la freŝajn, helajn kolorojn de multspecaj bulbokreskaĵoj.

Dum la supre menciita periodo okazos grandioza florekspozicio, kiu okupos 25-hektaran terenon kun aleoj, herbejoj kaj laĝetoj. Pli ol 5,000,000 da florbulboj, pli ol 100,000 plantoj, arboj kaj arbustoj en la venonta printempo florados honore al la floramanta publiko el ĉiuj mondpartoj.

La organiza komitato de la ekspozicio eldonis simplan, sed klaran kaj bonludgvan sespaĝan faldfolion esperantan por inviti ankaŭ la esperantistan publikon al nenaj bela kaj riĉa florfesto en Nederlando.

Gesamideoj, petu senpagan alsendon al s-ro E. de Wolf, ĝenerala sekretario de la Nederlanda Asocio Esperantista „L.E.E.N.“, Joh. de Breukstr. 18 Harlemo, Nederlando.

Vizito al la ekspozicio povos koincidi kun partopreno al la VI-a Nederlanda Esperanto-Kongreso organizota de „L.E.E.N.“, je la 30a de marto en Harlemo. Ankaŭ tie eksterlandaj gesamideoj estos kore bonvenaj. Por informoj oni sin turnu al la sama adreso.

Aliajn gazetojn ni afable petas, represi ĉi tiun artikoleon kaj sendi ekzempleron al: Direkcio „Flora“, Heemstede (Nederlando).

## ESPERANTO EN POLAJ RADIOSTACIOJ.

Ni ĝojas prezenti la programon por la plej proksimaj du monatoj.

10. IV. merkr. Prof. Dr. O. Bujwid: Marja Curie-Skłodowska (okaze de ŝia entombigo en la Pariza Panteono).

25. IV. ĵaŭdo. Tad. Hodakowski: Interparoladoj kun aŭskultantoj en Esperanto.

8. V. merkr. Iu priliteratura prelego. Detaloj sekvos.

15. V. merkr. Dr. Jerzy Dobrzycki: La sorĉita mondo de la subterajoj en Wieliczka.

29. V. merkr. Prelego pri skolta jam-boreo en Pollando. Detaloj sekvos.

30. V. ĵaŭdo. Tad. Hodakowski: Interparoladoj kun aŭskultantoj en Esperanto.

La merkredaj prelegoj okazados de la 21h.30m.—21h.40m., la ĵaudaj — 23h.30m.—23h.45m. La sendohoroj estas laŭ **MET**. Dissendos regule **Kraków kaj Warszawa**, eble ankaŭ aliaj stacioj. Gesamideoj aŭskultu multnombre kaj danku al: **Polskie Radio, Warszawa**.

## K O M U N I K O.

Responde je la tre multaj mir-demandoj, ricevitaĵ la lastajn tagojn, mi permesas al mi komuniki al la publika scio, ke mi nenion komunan havas kun la aŭtoro de la artikolo „La germana vidpunkto pri la rasproblemo“, aperinta en la decembra numero de la ĝeneva „Esperanto“ kaj subskribita per literoj E. W.

Ĉeokaze mi ankaŭ komunikas, ke kun plej granda kor-doloro, post dudekjara seninterrompa aparteno al U. E. A., mi nunjare ne renoviĝas mian membrecon (ĝuste pro la citita artikolo).

31. I. 35. **Edvard Wiesenfeld**, Varsovio.



imponajn produktaĵojn. En lastaj monatoj per plibonigado kaj disvolvado de aeroplano de tiu tipo la Ŝtataj Aviadaj Uzinoj ricevis la plej rapidan en la mondo ĉasaeroplanon t. n. Su- per P, donantan rapidecon de pli ol 400 km pohore.

Ne malgranda disvolvono oni devas ankaŭ noti sur la kampo de komunika aviado. Longtempe ĝi estis organizita kiel privata kompanio kaj uzis sole subflugilajn aparatojn germanajn de tipo Junkers. Ĉar duraluminio, el kiu estas konstruitaj Junkersoj ne povas esti produktata en la lando, montriĝis nepre necese transiri sur alian tipon. Tiu tipo fariĝis Fokkeroj, produktataj ĉe ni, konstruataj sur bazo de fremda licenco, komence unumotoraj poste trimotoraj.

Nia komunika aviado same en jaroj, kiam ĝi estis direktata de privata kompanio, kiel hodiaŭ, kiam ĝi restas sub ŝtata gvidado, povas noli grandiozajn rezultojn. Ĝia lerteco, precizeco, ideala sendanĝereco, la plej bona en la mondo, statistiko, faris, ke ekspansio de la pola komunika aviado al landoj limantaj kun Polujo, kaj eĉ sufiĉe malproksimaj, fariĝis reala fakto. Polaj komunikaj linioj de Tallinn kaj Riga ĝis Salonikoj en Grekujo ligas du marojn kaj kredeble ili estos baldaŭ plilongigitaj tiamaniere, ke per uzo de hidroplanoj ili atingos Palestino. Tiamaniere en cirko de polaj aviadaj influoj troviĝas Estonio, Latvuj, Rumanujo, Bulgario kaj Greklando.

Fine la lasta fako de aviado, en kiu polaj sukcesoj estas pli mirigaj, ol en aliaj fakoj, kaj krome ili estas tute precize mezureblaj, tio preskaŭ neniam okazas ĉe militista aŭ komunika aviadoj. Militistaj aviadistoj de diversaj landoj ĉre malofte partoprenas en komunaj vetflugadoj, kiuj povus elmontri nivelojn de ilaro kaj kvaliton de pilotoj, kaj la komunika aviado neniam aranĝas tiajn vetojn. Sed la avia aviado de sia nivelo en internacia vetflugadoj. Ili estas unusola kaj senduba kontrolilo de ĝiaj akiraĵoj.

Nia avia aviado sporto estas tre juna. Ĝiaj unuaj komencoj datigas de 1. j. 1927. Ĝi estis la periodo de suĉinfaneco de nia avia aviado sporto. Privataj produktantoj kaj hejme edukitaj konstruistoj kelkfoje verkaĉis aviadiletojn. Tamen de 1. j. 1928

okazadas en Polujo sisteme kaj landaj vetflugoj de turistaj aeroplanoj, protektataj de 1' ŝtato kaj de potenco organizaĵoj, kia estas Ligo por aera defendo de 1' ŝtato. Jaron post jaro ili alportas novajn akiraĵojn kaj plibonigojn. Ankoraŭ en la j. 1929 la ĉefa sportaviado, kiun hodiaŭ ni lasis multajn melojn post ni, povis nin ne unurilate imponi. De du jaroj niaj rezultoj en la avia aviado sporto starigis nin sur unua loko inter ŝtatoj de Eŭropo.

Ankaŭ en tiu fako principo, kiu alportis al ni venkon, estis la principo de memsufiĉeco. Longtempe ĝi koncernis la fremdajn aeroplanojn, nun kredeble ĝi koncernos ankaŭ la motorojn. Fariĝis la honora afero inter la polaj aviadaj sportuloj ne aĉeti kaj ne importi turistajn aviadilojn de fremda deveno, por ebligi al landaj konstruistoj kreon de propraj tipoj.

El plej altaj rezultoj de nia sportaviado ni povas esti fieraj. Dum 6 jaroj ni alkondukis ĝin de 1' suĉinfaneco al grandioza juneco kaj fero vere vira. Eksperimentaj aviaduzinoj, nomataj de nomoj de iliaj fondintoj ing-oj Rogalski, Wigura kaj Drzewiecki, per signo RWD (Wigura, kiel sciate mortigis traĝeterura ventego) — konstruas ĉiam pli bonajn turistajn aeroplanojn. R. W. D. 2 kaj R. W. D. 4 estas aviadiloj turistaj, ĉiu en alia kategorio fiksita de internacia federacio aviadistoj. R. W. D. 5 estas eleganta limuzino (kaleŝo), kiu estas respondanta al la angla Puss-Moth. R. W. D. 7 estas malpezega aeroplano kun 80-ĉevalpova motoro, kio ebligas preskaŭ vertikalan starton. R. W. D. 8 estas porinstrua aviadilo kun bonegaj aerodinamikaj ecoj.

Sed sukcesojn al nia avia aviado sporto sur internacia areno certigis R. W. D. 6 kaj R. W. D. 9. Kiam karmemora ĝwirko kuras kun karmemora Wigura akiris en i. 1932 per kvanto de kelkaj punktoj venkon dum internacia challenge en Berlin, oni ankoraŭ povis tion klarigi per feliĉa hazardo. Sed kiam en 1934 dum la challenge en Varŝavo Bajano kaj Płoneczyński akiras du unuajn lokojn per grandega supereco de punktoj, ni devas tion konsideri ne nur grandioza sukceso de braveco, persisteco kaj sinorientado de niaj pilotoj, sed — kio estas



Cu vi jam havas la faman verkon de  
**MICKIEWICZ: SINJORO TADEO**

en traduko de **A. Grabowski?**  
Aĉetu ĝin ĉe „Pola Esperantisto“, kon-  
to PKO 406.660. Prezo zł. 8.— plus 10%  
sendkostoj.

Cu vi volas feliĉa esti en la edzeco?  
Se jes, neprokraste mendu

**„EDZECAN VIVON“**

libreton por personoj nur pli aĝaj de 16  
jaroj. Prezo: 2 respondkuponoj afrankite.  
Adreso: **Stjepan Mišali, Esperanto eldo-  
nejo, ADANA (Turkujo). Giriltj; Maha-  
llesi 94.**

**B. R A D Z I M I Ń S K I**

**„En domo kaj en lernejo“**

malgranda lernolibro de la lingvo Espe-  
ranto. Prezo 85 gr. kun aŭranko.  
Havebla ĉe „Pola Esper.“ **Kraków,  
Lubicz 34. Konto PKO Nr 406.660.**

**NASKIĜTAGO.**

Kiam vi naskiĝis? demandas en lerne-  
jo instruistoj!

— Tute, mi ne naskiĝis!

Mi havas duonpatrinon.

pli grava — grandioza triumfo de nia konstrua penso, ĉar la pleiparto de punktoj estis akirebla en konkuro precize teknikka, kie skrupule estis konsiderataj kvalitoj de l' aeroplano, kiel ĝia videblo, mallongeco de starto kaj surterigo, minimuma rapideco, certiganta sendanĝerecon en la aero.

Apartan gravecon al nia sukceso akirita en challenge donas la fakto, ke la venkaj aeroplanoj R.W.D. 9 estis provizitaj per motoroj komplete fabrikitaj en la lando, motoroj de Skoda. Do ni povas kun ĝojo konstati la fakton, ke jam en plej proksima estonteco pola piloto, sportulo kaj aviada turistoj flugos super landoj de Eŭropo per aviadiloj komplete fabrikitaj en la lando. La pola sportaviado en sia rapida disvolvado ne nur kuratingis aliajn fakojn de la aviado, sed eĉ laŭ ne unu rilato ilin superis.

**(daŭrigo).**

riate apogi sin sur aĉetatoj farataj eksterlande, precipe en Francujo. Sed malrapide, precipe de kiam stabiligis en Polujo la registaro de Marsało Piłsudski, kaj la tutaj de aviadaj aferoj jam povis aparteni al tuteca direktado, povanta labori sur bazo de programo pri kalkulita por pli longa tempoperiodo — la cirkonstancoj komercas sangigi. La eŭdirektadon de l' aviadaj aferoj en armeo prenas departemento de aviado en ministrejo de militistaj aferoj, gvidata de kolonelo, nun ĝeneralo Ludomir Rajski, kiu, mem estante bonega piloto, kies nomo estas konata ankau allande pro belegaj longstancacaj flugoj, enkondukas sortojn de nia militista aviado sur unusolan vojon, kiu povas certigi grandiozan estontecon.

La unua tasko, kies solvon oni komencis, estis la sendependiĝo koncerne la materialon, el kiu konsistas niaj aeroplanoj, de allanda importado. Memsufiteco en fakto de la materialoj devis esti la bazo, sur kiu povis disvolviĝi la krea konstruado, ne minacata per detranco for de fontoj de la materialo.

Poste laŭvice oni prilaboris originalajn tipojn de aeroplanoj en plej diversaj fakoj. La lokon de fremda aeroplano okupis tuj komplete fabrikita en la lando, do la aeroplano konstruita el la pola materialo, laŭ planoj de polaj ingeneroj, kun motoro fabrikita en Polujo. La laboro eksterordinare atenuigis en la lastaj jaroj. Krom la batalinta aviado, kiu pliparte ankoraŭ priservas sin per francaj aeroplanoj de diversaj specoj, de tipoj Potez kaj Breguet, ĉiuj aliaj fakoj de aviado estas preskaŭ sendependigitaj.

Precipe oni devas substreki la valoron de ligitaj aeroplanoj fabrikataj en Lublin, de tipo „R“, valorojn de bombard-aeroplanoj de tipo Farman — trimotoraj, fine — kaj ĉi tie ni notas la plej grandan sukceson sur tereno de l' internacia aviado — bonegan kvaliton de militaj ĉaseroj. Tio estas konstruistoj estis tragiede mortinta dum aviadakatastrofo ing. Puławski. Tuj aeroplanoj multfoje montrataj ekster limoj de Polujo kaj limoj de Eŭropo, ĉie vekis admiron kiel ĉasaparatoj kun bonegaj kvalitoj. Eksterordinara rapideco de levigado, grandioza turniĝemo, grandega koeficiento de eĥempovo, permesis al niaj aviadaj asoj plenumi sur ili



A. S. PUŠKIN.

## SONETO PRI SONETO.

Severa Dant' soneton ne malŝatis,  
Amant' — Petrarca flamis en soneto,  
Ludiĝis ĝin kreinto de Makbeto,  
En ĝi Camoens pens-funebre satis...

Kaj ankaŭ nun ĝi plaĉas al poeto:  
Wordsworth'a kor' en ĝi pli vigle batis;  
Kiam bru-mondan vanton li konstatis,  
„Naturo“ — kantis — „jen belec-sekreto!“

Sub montla omb' en Taurid' malproksima  
Mickiewicz per la ĝia ritmo lima  
Revajojn siajn brilmomente dresis...

Ankoraŭ ĝin ne konis inoj niaj, —  
Delvig pro ĝiaj sonoj harmoniaj  
Sankt-kanton jam de l' heksametr' for-  
gesis.

El la rusa origalo tradukis  
Leo Belmont

LA BELECO DE ESPERANTA  
PRONONCADO.

Antaŭ nelonge amerika ĵurnalo publi-  
kigis liston da vortoj kaj silaboj franc-  
lingvaj, kiuj spite de granda maisameco,  
ĉiuj same prononciĝas. Post plibonigo de  
franca kompetentulo, jen la listo: San,  
Sand, Sang, Sangs, Sans, Sant, Saens,  
Sem, Sen, Sent, Sens, Sem, Scen, Cen,  
Cent, Cents, Cens. Sekvas ankaŭ kelkaj  
vortoj anglalingvaj, en kiuj la samliteru-  
mila silabo OUGH prononciĝas naŭoble  
maniere: „THOUGH the TOUGH CO-  
UGH and HICCOUGH PLOUGH me  
THROUGH, O'er life's dark LOUGH my  
way I'll still pursue“. Ankaŭ: „I OUGHT  
not to HOUGH my horse in the  
LOUGH“. Kiom da tempo, da malfacila-  
joj, kaj da larmoj Esperanto evitiĝas al  
siaj lernantoj!

H. B. H. en Amerika Esperantisto n-ro  
januara 1935.

## 27-a Universala Kongreso de Esperanto en Roma 1935

## KOMUNIKO N-ro 1.

**Organiza Oficejo** estas „Esperanto-  
Centro Itala“. Ĉiun korespondajon, do-  
kumenton kaj menseendon koncernantan  
la kongreson bonvolu adresi nur al: „E-  
speranto-Centro Itala“, Galleria Vitto-  
rio Emanuele 92, Milano (Italio). Tele-  
gramadreso: „Esperanto“, Galleria 92,  
Milano. — Poŝtĉeka konto: Esperanto-  
Centro Itala, Milano, N. 33.18 715.

**Kotizoj:** Baza kotizo Liroj 100.—, fa-  
vorkotizoj por familianoj kaj junuloj.

a) plena kotizo b) familiano c) junulo

ĝis 30. 4. 1935.	80.—	48.—	32.—
„ 30. 6. 1935.	90.—	54.—	36.—
„ fino	100.—	60.—	40.—

Estas fiksita speciale notinda kotizo  
por institucioj kaj entreprenoj, firmoj,  
grupoj ktp., kiuj deziras esprimi sian in-  
tereson kaj sendi sian aprobon al la celo  
de la kongreso mem. Tiuj helpkongre-  
sanoj ricevos la ĉefaj kongresdokumen-  
tojn, ne rajtos sendi reprezentanton, sed  
ili tre forte subtenos morale la kongre-  
son, se ilia nombro estos alta, kiel espe-  
reble.

La kotizo de helpkongresano ne rajti-  
gas je rabatoj kaj estas Liroj 40.— se-  
nescepte.

**Rajtoj de la kongresano:** Ĉiu kongre-  
sano rajtos partopreni la kunsidojn kaj  
la prelegojn de la kongreso kaj similajn  
aranĝojn. Ĉiu kongresano, krome ricevos  
tre grandajn rabatojn ĉe la turismaj a-  
ranĝoj de la organiza oficejo „Esperanto-

Centro Itala“ okaze de la kongreso mem.  
Ĉiu kongresano ricevos la oficialajn ra-  
portojn de UEA kaj de aliaj oficialaj in-  
stitucioj de nia movado; li ricevos krome  
urboplanejojn kaj gvidlibretojn de la L.K.K.

**Datoj de la Kongreso.** Jen la ĉefaj ta-  
ĝoj de la Kongresaj aranĝoj:

En Firenze: 3 aŭg. 1935. malfermo de  
la Somera Universitato.

En Roma: 5 aŭg. 1935. Solena Malfer-  
mo de la Kongreso.

En Roma: 7 aŭg. 1935. ĉefaj kaj fakaj  
kursidoj; Internacia Balo.

En Napoli: 9 aŭg. 1935. Granda Kon-  
gresita Ekskurso.

En Napoli: 10 aŭg. 1935. Fermo de la  
Kongreso; komenco de la Kongresa Kro-  
zado al Afriko.

En Genova: 17 aŭg. 1935. fino de la  
Kongresa Krozado. Fermo de la Somera  
Universitato.

**Kongresa Krozado:** Ripoza vojaĝo per  
granda ŝipo sub Esperanta flago, en la  
blua Mediteranea maro: de Napoli al Si-  
racusa (Sicilio), Insulo Malta, Tripoli en  
Afriko, Palermo (Sicilio), Insulo Elba,  
Genova.

Ne nur simpla ordinara postkongresa  
ekskurso, sed parto de la kongreso mem,  
ĉefa sidejo de la Somera Universitato  
estos la Kongresa Krozado. Per ĝi unu-  
afoje Universala Esperanto-Kongreso tu-  
ŝos la Afrikan teron. Ĝi estos impona  
kaj alloga unika propaganda vojaĝo.

**Turismaj aranĝoj:** Grava novaĵo de la Roma Kongreso estas, ke la gesamidenanoj havos la eblecon ŝpari monon kaj samtempe vojaĝi tre komforte sen ekstera helpo, sed simple per UEA-turisma servo.

Tian aranĝon antaŭvidas la L.K.K. en plena akordo kun UEA por plej bone utili al la gesamidenoj. Estas nepra devo eluzi vojaĝon grandiozan kaj intereseĝan laŭ ĉia vidpunkto, kiel estas la vojaĝo „Tra Italio“ kaj al Afriko. La kongresanoj, regule pagintaj la kongresan kotizon, rajtas je fortaj rabatoj ĉe la turismaj kotizoj. Ĉi sube, apud la plenaj kotizoj, validaj por simpla turisto ne-kongresano, estas indikitaj la rabatitaj kotizoj, validaj nur por kongresano.

**Baza kotizo** (por la tuta granda vojaĝo „Tra Italio“):

Fervoja vojaĝo de itala limo ĝis Napoli kaj reen ĝis itala limo; turisma aranĝo en Firenco, Roma, Napoli kaj survoje, laŭ la detala programo; Granda kongresa ekskurso Napoli—Pompei—Capri—Napoli; ekspedoj kaj transportoj de la pezaj pakajoj; plena kotizo 526 (por kongresano 498 liroj).

**Kongresa krosado** („Al Afriko“, granda ŝipvojaĝo septaĝa). Ŝipvojaĝo de Napoli al Siracusa, Malta, Tripoli, Palermo, Insulo Elba, Genova; lito kaj tri manĝoj tage sur la ŝipo; teraj ekskursoj kaj vizitoj; prelegoj kaj festoj sur tre komforta speciala ŝipo; loko en:

	plena kotizo	por kongresano liroj
S.: salono, kun multaj litoj	375.—	355.—
A.: kajuto, 2—4 litoj, turista klaso, interna	495.—	472.—
B.: kajuto, 3—4 litoj, turista klaso, ekstera	518.—	495.—

**Notoj:** La tuta aranĝo sur la ŝipo estas absolute komforta; la ŝipo mem estas

speciale aranĝita por turismaj krosadoj.

La manĝoj estas egalaj por ĉiuj klasoj; la diferenco de la prezoj estas pro la malsameco de la kajutoj kaj de la rilata komforto en la superaj klasoj.

En la salonoj kun multaj litoj ne estas supermetitaj ŝipkuŝejoj, sed apudmetitaj tre bonaj ferlitoj, kun sufiĉega spaco, apartaj duŝejoj ktp.

Ĉar la nombro de la lokoj sur la ŝipo estas precize limigita, la aliĝoj devas alveni kiel eble plej frue.

La unuaj aliĝintoj ricevos nepre ĉian preferon.

**Libervolaj ekskursoj:** estas en preparo multaj libervolaj ekskursoj. Detaloj poste.

**Fervoraj rabatoj:** La kongresanoj povos certe profiti la efektivan rabaton je 50%, kaj specialaj favorkondiĉoj por la vojaĝoj en Italio estas laŭeble havigataj. La plej konsilinda rimedo por vojaĝi malkare estas tamen simple aliĝi — kiel eble frue — al la turismaj aranĝoj.

**Loĝejo kaj manĝoj:** Bona komforta ĉambro en konvena hotelo duaklasa kostas 8—14 lirojn; en unuaranga 20 lirojn; en luksa 30 litojn, aŭ iom pli multe. Ĉiuj diritaj prezoj por ĉambroj sen aparta banejo kaj sen matenmanĝo. Plena matenmanĝo kostas, laŭ lokoj, de 7—15 lirojn. Por 10 liroj oni povas ricevi kontentigan plenan manĝon.

**Kurzo de la Liro** estas ĉ. 45 groŝoj.

**Radio:** Italaj Radio-stacioj jam dissendas en pluraj lingvoj informojn pri la 27-a Univ. Kongreso. En preparo dissendoj en Esperanto. Oni bonvolu skribi ofte al E.I.A.R., Radio-Roma, ROMA petojn pri disaŭdiĝoj pri la Kongreso en Esperanto.

Ĉiuj informojn donas Pollanda Esperanto-Delegitaro, KRAKÓW, ul. Lubicz 34.

Aldonu pmarkon por respondo.

Ludwik Kutscher  
ekz.-ano de P.E.D.

## LASTRESPONDE AL LA RECENZINTO.

Al mia kontraŭriproĉo s-ro Dreher respondas nur al kelkaj punktoj, per kio li plene konfesas, ke en la aliaj okazoj liaj dekretitaj eraroj estis falsaj. Li konfesas ne nur, ke li malpravas kaj eraris, sed li ankaŭ konfesis, ke eble pro iama granda amikeco kaj por plenumi serioze taskon de recenzinto, li „vere rapidece faris tecenzon“.

Al liaj novaj rimarkoj (ne plu „riproĉetoj“) mi ankaŭ rapidas respondi.

Antaŭ ol paroli pri la lingva flanko

mi volus afable rimarkigi, ke ne sufiĉas loĝi kaj admirari la francan kulturon por — „franciĝi“, almenaŭ kun mi (ĉu bone?) tio ne okazis.

Ĉiu verko senescepte (ankau la artikoletoj de s-ro D.) havas erarojn.

Devo de recenzisto estas ne nur citi erarojn (mi pensas al veraj eraroj, s-ro D.), sed ankaŭ la bonajn flankojn.

Devo de recenzisto estas studi verkon ĉiularke kaj ĉiurilate kaj ne facilanime uzi devas estis tiel kaj ne tiel, antaŭ



ol li ne centfoje pripensis, trakribris, serĉis kaj konvinkigis, ke tiu uzo estas absolute erara. Tion li ŝuldas ne nur al aŭtoro, sed ankaŭ al la legantoj por ne mistifiki ilin.

Oni devas (jes ĉi tie oni povas uzi „devas“) bone pripensi antaŭ ol ĵeti fakson da „eraroj“, kiuj ne estas eraroj, eĉ kiam oni recenzas verkon de sufiĉe malnova esperantisto.

Sed nun al kritikoj.

Mi deklaras al s-ro D., ke Grosjean-Maupin plene konsentis al mia klarigo de petrolo kaj nafto, sed estis jam — bedaŭrinde — malfrue por korekti en P. V.

— enua. S-ro D. estas sprita. Li diras, ke laŭ P. V. enua signifas „de enuo“. Sed s-ro D. bonvolu legi en P. V. nur du liniojn pli kaj li trovos ankaŭ „kaŭzanta enuon“. La Zamenhofema Dreher fariĝas volonte „kontraŭ-Zamenhofa“, kiam estas necese sindefendi..

Me'aforsence oni diras: je doj, al diabloj, oni povas ankaŭ „sakramenti“ kaj eldiri sakramentan well... eĉ se oni ne trovas tiun esprimon en P. V., kies — kunaŭtoro mi ankaŭ estis..

Sildo havas la sencon de elpendaĵo. Vidu P. V.

Kun la banado. S-ro D. volas pri. Kial? Sed ni citu komplete la koncernan frazon: kun la banado estas iom pli malbone, ĉar... ktp. Kun esprimas ĉi tie konstantan detalon, karakteron, kiun oni provizore konsideras aparte de l' tuto. Jen zamenhofa ekzemplo: kun sia karaktero la sincera li ne esploras la rapirojn.

Tiu kun-uzo estas tiom same bona, kiom en jenaj frazoj: kun la recenzoj estas ĉiam pli malbone; kun la kritiko ankaŭ; kun la amikeco relative...

— preni en la senco de konsideri estas

ofte uzata, tute zamenhofa V-d. P. V.

— klarigi ion pro aŭ per ambaŭ estas bonaj depende de la senco.

— perdi la fidon en la sincero estas same bona, eĉ pli bona ol kun je, kiun oni rekomendu (eĉ al s-ro D.) eble plej malmulte uzi.

Anst la drehera „ĉar vi kredas je la destino“ mi preferas al aŭ en kun akuzativo, ĉar oni ofte diras al la lernantoj: ne tro uzu je kaj anstataŭigu ĝin ĉiam, kiam vi povas!

Cetero al „preferoj“ ne decas respondi, ĉar pri homaj gustoj kaj gajno de trustoj oni ne — parolas..

En la nova pakajo da „eraroj“ s-ro D. sukcesis doni nur du preserarojn: anst. ŝtrumpetoj devus esti -jn kaj en destino devus esti -n. Ĉu serioza kritikisto konsiderus ilin eraroj? Eble, ĉar li povus supozi, ke mi ankoraŭ ne scias uzi akuzativon..

Dume la diktatoro Rollet de l' Isle sendis al mi raporton de la Sekcio de Kontrolo, faritan de s-ro Boucon, tute ne mia amiko, kiu diras jenon pri mia traduko: „La stilo estas ne nur korekta, sed eleganta kaj facile legebla.. kaj entute pri la grenkampa traduko de Mia vojaĝo en Sovetio mi sincere diras, ke ĝi estas admirinde flua, klara kaj belsona“. La aliajn recenzojn vi povos legi en aliaj gazetoj.

Mi finas ĉi tiun jam tro longan nolon per jena peto al la Redakcio; bonvolu estonte miajn librojn transdoni por recenzo al miaj pasiaj — malamikoj.) Mi pli ŝatas seriozan kritikon de malamiko, ol — nenian kritikon.

S. Grenkamp

\*) Vi povus prepari liston ĉe la Redakcio!..



## POLLANDA KRONIKO



**BRODY.** Je invito de la delegito demajna poeziojn ĉe akompano de pianistino fino M. Liljan. Multe aplaudita S-ro Schnützer kaj organizis kelkajn prelegojn pri Hindujo. La 11. I. 1935. okazis en la salonego de la urbo sub la protekto de la starosto S-ro doktoro Kaczowski kaj urbestro S-ro Kochanowski grandstila orienta vespero kun prelego de S-ro Schnützer pri Hindujo, lando de fabeloj. S-ro prof. de muziko M. West ludis lerte kelkajn originalajn hindajn kaj japanajn melodiojn. S-ro Wl. Korman kantis du belegajn orientajn kantojn. F-ino Stan, Herbert deklamis hindajn kaj japanajn ĉar-

ĝo kun muziko kaj kanto por la ĝelernan-

loj de ĉiuj lokaj lernejoj. Granda estis la entuziasmo kaj ekintereso de junularo.

Mi dankis al Sro Schnülzer pro la fervoro kaj mi esperas, ke lia alveno al Brody estos fruktedona por nia tiel ne-glektita kampo.

Oskar Spielmann,  
delegito de UEA.

**BYDGOSZCZ.** En „Kurjer Bydgoski“, nro 34, aperis artikolo s. t. „Bydgoszcz en kontakto kun la tuta mondo“, en kiu la aŭtoro prezentis siajn impresojn post vizito al Esp.-fako de Lerneja Muzeo, kie li estis informata de prof. Sygnarski.

**KRAKÓW.** La 13. II. okazis en la Pola Esperantis'a Kluĉo „ĝenerala kunveno“. Al la estraro oni elektis: prezid. — Dir. inĝ. Eug. Tor; vicprez. — Tad. Hodakowski; sekret. — Irena Szczepańska; kasist. — Janina Zagajewska; bibliot. — Dr. Wanda Koczorowska; Krom tio membroj de estraro: Katarzyna Terowa, Jadwiga Kostecka. Dir. inĝ. Edw. Kostecki, Jerzy Sowiński, Antoni Uliński. Komisiono revizia: Mieczysław Piotrowski kaj Franciszek Zieliński.

La 29. II. en P. E. K. okazis prelego de s-o Tad. Hodakowski pri esperanta stilo kaj gramatiko.

**LUBLIN.** La 16. I. k. j. en ejo de P.E.A. (Królewska Nr. 6) honora membro de la Societo. D-ro Jan Medrkiewicz faris antaŭ mult-ombre kolektiĝinta aŭskultantaro tre interesan preleŝon je temo: „Internacia Konferenco de Ŝtatoj kaj Internacia Lingva Traktato“. Post la preleŝo Vicprezidanto de S-to S-ro E. Dziejewicki malfermis diskuton, en kiu partoprenis multaj ĉeestantoj.

En januaro k. j. la Societon vizitis: s-ro T. Pleskaczynski (el Garwolin) kaj s-ro Liedke (el Łódź).

Samideanoj, trapasataj Lublinon estas ĉiam kore invitataj.

**LWÓW.** Dank' al nia tre estimata Radio-Direktoro Petry kaj ties ĝentila sekretario s-o Sadowski okazis tre interesa intervjuo kun la mondvojaĝantoj-samideanoj Looŝis el Estonio kaj Kraŝev el Vien, Aŭstrio. La internacian sp. i. te gvidis Prof. D. Karol Klein, Delegito de UEA.

Per nia nacia gazeto „Pola Esperantisto“ esprimas profundan dankon al la reprezentantoj de POLSKIE RADJO, LWÓW pro la neatendita plezuro, donita al niaj Lvovaj Esperantistoj, fervoraj aŭskultantoj de nia sendstacio. — M. Mantel por Societo Esperanto.

Societo Esperanto aranĝis prelegvesperon de Prezidanto Dr. I. Fels, kiu plezurigis la aŭskultantojn per laŭtleĝo de noveloj. — Samvespere prelegis f-ino M. Mantel el propraj verkoj.

Kurson gvidas f-ino Nadel.

**RADOM.** Fine de januaro k. j. fondiĝis nova rondo s. n. „Pola Esperantista Kluĉo“. La organizan kunvenon, kiu okazis la 25-an de januaro partoprenis 25 personoj. Kiel prezidanto estis elektita unuanime s-ro Sztec Zygfryd, kaj kiel estraranoj s-roj Kuhl, Duljas, Felter, Wojtas.

La estraro energie ekkomencis la laboron. Oni organizis kurson por skoltaj kiuj partoprenos en nunjara jamboreo en Spala kaj Stockholm.

Kurson gvidas s-o Duljas kun favora helpo de s-ro Kuhl; partoprenas 30 gimnaziaj skoltaj el 7 kaj 8 klasoj.

La 13-an de marto okazis ĝenerala kunveno, dum kiu s-ro Kuhl prelegis je temo: „Geneza i rozwój Esperanta w ciągu 40 lat“. Post la preleŝo ekestis vigla diskuto; i. a. proponis doktoredzino Kelles-Krauz, ke ĉiumerkrede oni kunvenu kaj faru esper. prelegon kun diskutado. La propono unuanime akceptita.

**WARSZAWA.** La 21. II. ĉe la Universitato, en ĉeesto de la kuratoro, prof. Dr. Stefan Balev, okazis la jara kunveno de la Akademia Esperantista Rondo. Al la kunveno venis 30 kelkaj personoj, membroj de A.E.R. — La kunveno malfermis la estinta prezidanto de A.E.R., s-ro Henriko Giełb, kiu faris raporton pri la agado de la Rondo. — La A. E. R., estis antaŭe societo, al kiu apartenis studentoj E-istoj de ĉiuj altlernejoj en Warszawa. La pasintan jaron estis eldonita leĝo, malpermesanta tiajn, interuniversitatajn societojn. Tial oni devis reorganizi la societon, por ke restu en ĝi studentoj nur de unu altlernejo (de la Varŝava Universitato), kaj legaligi ĝin ĉe la Varŝava Universitato. Post longaj klopodoj la Rondo ricevis legalizon kaj kuratoron, kaj ĝi rice, en malpli granda aro, komencis sian laboron. Estas elektita nova estraro, kies prezidanto estas la eks-ĝenerala sekretario de A.E.R., f-ino D. Kagan. La nova estraro jam ekklopodis aranĝi kursojn de Esp. kaj trovi konvenan ejon por la societo. La kuratoro, prof. Balev, promesis klopodi ĉe la Universitata Senato pri subvencio por la A.E.R. La provizora adreso de la Rondo estas: Warszawa, Chłodna 20/52.



## GRAVA SKOLTA ALVOKOI

La XIII-a Internacia Tendaro de la Skolta Esperantista Ligo okazos en Pollando en julio 11—24, 1935. Ĝi estos aranĝita en Spaa (Spaia), en la somera rezidejo de la Prezidanto de Pola Respubliko, sub alta Protektorato de la Prezidanto, prof. Ignacy Mościcki kaj la Marŝalo Józef Piłsudski. En la Honoran Komitato eniris skoltaj kaj esperantistaj eminentuloj. La Tendaron invitis la Pola Skolta Asocio, kiu oficiale sendis invit-leterojn al la Skolta Esp. Ligo — Netherton-Huddersfield, Anglujo, kaj al la naciaj skolligoj, apartenantaj al la Skolta Internacia Kontoro (Londono).

La Organiza Komitato prizorgos por tiuj, kiuj anoncos sin plej malfrue en majo, rabatojn sur fervo-

joj, ankaŭ de najbarlandoj. Bonvolu tien sciigi al la lokaj skoltaj asocioj, ligoj, trupoj kaj instigi ilin, ke ili reprezentu sin simile, kiel okaze de aliaj internaciaj tendaroj. La reprezentantoj povas dum printempo lerni Esperanton, ili povas esti parte la samaj, kiuj partoprenos (reprezentante vian landon) la Jubilean Nac'an Jamboreon tuts-lavan aŭ plej vojaĝon dumvoje al la okazonta tuj poste Tutmonda Rover-Skolta Jamboreo en Svedujo (29 julio — 5 aŭgusto 1935).

Helpu la tujan praktikan utiligon de la lingvo per energia instigado. — Sendu adresojn de la skoltoj, kiuj scias Esperanton! Postulu precizajn informojn de

La Organiza Komitato de S.E.L. Tendaro  
Pollando, Kraków, Lelewela 9. m. 2.

## NOVAĴOJ EL ESPERANTUJO

La tre konata vojaĝoficejo „Orbis“ kaj nome ĝia oficejo en Parizo (5, rue de la Chaussée d'Antin) ekuzis esperanton. Ni tre ĝojas, ke ĝi ekkomprenis la valoron de nia lingvo kaj tur plej varme povas rekomendi al ĉiuj esperantistoj ekuzi la servojn de tiu oficejo. La vojaĝoficejo „Orbis“ havas jam pli ol 60 filiojn en Polujo kaj en ĉefurboj de Aŭstrio, Germanujo, Belgujo ktp.

Kiel oficiala reprezentanto de fervojoj, ŝipkompanioj kaj aerlinioj ĝi liveras ĉiajn biletojn je originalaj prezoj.

Se ni montras nian intereson kaj uzos ĝiajn servojn, ni povos gajni gravan entreprenon, kiu povos fari multe por ni.

Delonge oni deziris havi vortaron, kiu enhavu nur oficialajn vortojn. Ĝis ni ekscias, ke troviĝas jam sub preso „oficiala vortaro“ de S. Grenkamp kun nuraj esperantaj difinoj kaj en poŝformato.

Ni estas certaj, ke tia eldono havos sukceson.

Nia samlandanino, fino Lidja Zamenhof, ĉiam esikege propagandas Esperanton. Ĝis ni ricevis novaĵojn el Perpignan, kie ŝi gvidis la Cseh-kursojn kaj estis akceptita de la Urbeŝtraro, de la Rotary-Klubo kaj de la Klubo Le Cercle. Multajn pluajn sukcesojn!

O. B.

La 25 de februaro mortis Arnold Behrendt, longjara prezidinto de Germana Esp. Asocio, Lingva komitatano, bonega

propagandisto kaj brila preleginto dum multaj Esp.-Kongresoj.

Mi jam delonge konatiĝis kun li kaj ĉiam admiris lin kiel unu el plej talentaj fakuloj, parolantaj pri sia fako esperantlingve. En la nomo de polaj esperantistoj kaj de P.E.D. mi esprimas ĉi tie plej profunden doloron pro tiom ne atendita perdo por la tuta Esperantistaro.

O. Bujwid.

Franca Esperantisto akcentas admirindan agemon de Franca Parlamenta Grupo de simpatianoj de Esp., kiu konsistas jam de 77 anoj. La Grupo postulas de la Parlamento: 1. rekonon de la Franca Esper.-Asocio kiel Asocio de Publika Utilo. 2. Enkordukon de la lingvo en la lernejon kiel deviga lernobjekto. O. B.

Esperanto en kanadaj lernejoj. En oktobro de la lasta jaro oni komencis la instruadon de Esp. en la unua klaso en la oficialaj lernejoj de Kanado kaj en la vespera kurso de la universitato de Toronto.

Zamenhof-festo en japana radio. Dum la lasta Zamenhof-memortago multaj radio-stacioj de Japanujo dissendis diversajn paroladojn pri Esperanto en esp., japana kaj korea lingvoj.

„Język międzynarodowy“ nova pola-esp. gazeto, propagandas Esp. inter laboristaro. Bedaŭrinde ĝi konstante atakas la „burĝan“ esp. movadon. Redakcio: Warszawa, Marszałkowska 81, m. 33



## PROF. JAN MICHAŁ ROZWADOWSKI.

Mortis subite en Warszawa, kie li pre-  
paris prelegon pri filozofia temo. Estas  
granda perdo por la pola scienco, ankaŭ  
por Esperantistaro, ĉar li kune kun fa-  
ma prof. Baudoin de Courtenay estis  
simpatiulo de nia lingvo. Kiel rektoro de  
la Krakova Universitato li antaŭ kelkaj  
jaroj funkciigis la lektoradon de Espe-  
ranto ĉe la Universitato. Li diris sia-

tempe, ke Vera Scienco povas havi ne-  
on kontraŭ nia lingvo. Estas la vivo,  
kiu devas pruvi ĝan uzeblon.

La jus mortinta profesoro dum kelkaj  
jaroj estis Prezidanto de la Sciencia A-  
kademio. Li publikigis valorajn laborojn  
pri la lingvoscienco kaj pri filozofio.

O. B.

### ALIĜU SENPROKRASTE

al la jam 12-a eldono de  
**BES — ADRESARO**

de esperantistoj el ĉiuj landoj

la unika kaj por ĉiu bezona helpilo kaj  
propagandilo, ĉiujare aperanta kun pli ol  
1000 adresoj kaj portretoj de esperan-  
tistoj el pli ol 40 landoj, kun defala re-  
gistro de aliĝintoj laŭ profesio kaj inkli-  
noj, de E-firmoj laŭ fako, de E-Societoj  
kaj de E-gazetoj, de E-hoteloj, tiel ke  
ĉiu povas tuj trovi la deziatan adreson!

Aliĝa kotizo kun adresaro sole 1 Fsv.,  
publikigo de portreto O. 50 Fsv. — Anon-  
ca paĝo 25 Fsv. Detalajn informojn vi  
trovos en la 14-paĝa ilustrita prospekto,  
kiun al ĉiu volonte sendas la eldonejo:

**BES (Boh. E-Servo), Poŝteja,  
Ĉeĥoslovakujo.**

### SENOKUPAJ aŭ malmale okupitaj HOMOJ

kiuj dezirus facile perlabori monon kaj  
fariĝi memstaraj per hejma fabrikado de  
ĉiutaga bezonaĵo sen ia ajn maŝinaro kaj  
kun nura kapitalo de 15 Fsv. postulu  
senpage detalajn informojn de Ing. Ber-  
ger, estro de BES (Boh. Esperanto-Ser-  
vo), Poŝtejn, Ĉeĥoslovakujo. Projekto  
plene serioza, kiu havigos al ĉiu bonajn  
kaj daŭrain vivrimedojn je kosto de ni-  
raj poŝtelspezoj! Ekinteresiĝu bonvole  
viajn konatojn, se vi mem ne bezonas  
aŭ ne volas ekkanti tiun ĉi felicitan kaj  
eksterordinaran okazon!

### DR. FELIKS ZAMENHOF. (peto).

Ĉiu, kiu posedas ian ajn skribmateria-  
lon el sub la plumo de Dr. Felikso Za-  
menhof (FeZ) — ĉu manuskriptojn, ĉu le-  
terojn, ĉu paroladojn, ĉu ion similan —  
estas tre petata urĝe komuniki laŭ la  
suba adreso: S-ino Helena Zamenhof,  
Warszawa, str. Ma-szałkowska 48.

### ROZO: „Dro ZAMENHOF“.

Neŭtrala Centro de Esperanto en Pra-  
ha-Ĉeĥoslovakio, denove sukcesis ĉe nia  
ĉeĥoslovaka rozkulturisto, s-ro Jan Böhm,  
Blatná-Ĉ. S. R., ke li nomis nove plan-  
titan rozon laŭ nomo de nia Maistro, ro-  
zo: „Dro Zamenhof“.

S-ro Böhm estas favoranto de nia ko-  
muna lingvo kaj ĉiam subtenas nian la-  
boron.

La rozo: „Dro Zamenhof“ estas volvi-  
ĝarta kreskajo kun fortaodoro. Koloro  
de la rozo estas brile-karmin-ruĝa kaj  
la fundamento de la florfolioj estas or-  
flava. La vegetoj estas 4—6 metroj lon-  
ĝaj kiaj posedas belegajn vaksiglaceajn  
foliarojn. Ĉiuj rozkulturistoj ne forgesu  
ĝin aĉeti!

### Neŭtrala Centro de Esperanto en Praha.

La redakcio de P.E. dankas tre var-  
me al s-ro E. Wiesenfeld pro liaj multaj  
klopodoj, celantaj al havigo de la ma-  
terialoj por la n-ro dediĉita al Leo Bel-  
mont. La fotografaĵo de L. B., aperigita  
en tiu n-ro, estis farita de s-ro E. Wie-  
senfeld.

PRENUMERATA: rocznie zł. 8.—, półrocznie  
zł. 4.— Dla Towarzystw i grup esper. ro-  
cznie zł. 6.— Zagranicą: 5 fr. szw. Numer  
pojedynczy zł. 0.70. podwójny zł. 1.40.

OGŁOSZENIA: 1/2 strony zł. 30.— 1/4 strony  
zł. 15.— 1/8 strony zł. 10.— Korespondencja:  
male ogłosz. z 10 słów (prócz adresu) zł. 1.—

REDAKCJO KAJ ADMINISTRACJO: KRAKOW, LUBICZ 34.

ABONO: jare zł. 8.—, duonjare zł. 4.—. Por  
societoj kaj grupoj esperantistaj jare zł.  
6.— Eksterlande 5 sv. fr. Aparta numero  
zł. 0.70 duobla zł. 1.40.

ANONCOJ: 1/2 paĝo zł. 30.— 1/4 paĝo zł. 15.—  
1/8 paĝo zł. 10.— Korespondado: anonceto  
de 10 vortoj (krom adreso) zł. 1.—

KONTO P. K. O. NR. 406.600